GISTO, AUG,2005.

G.O.VASKE = Telf.**3635.1389 (sxangxita)**
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ottovaske@ibest.com.br
ttt-kongrua skribo.

FIERO

Neniam oni elstarigas sufiche multe la fikutimon **fiero** en chiuj iniciatoj de la vivo...chefe en nia kara Esperantio. Lau mi, tio devenas de la tradicia eduko inter ni brazilanoj. Se oni observas la sintenon de bonedukitaj personoj, facilas konstati la diferencon. Dum rondoj konversaciaj, ripetade audeblas, ekz. " tion fakton povas atesti grupo da amikoj, kie estis MI, Paulo, Johano kaj pluraj aliaj" – Bonedukita homo hontas pri sia fiero. Rezulte de tio li/sxi neniel citas sin unualoke, MI...MI... – La samon observeblas kiam ekz. dommastrino proponas frandajxojn al grupo da vizitantoj. Bonedukiteco instruas ke oni prenu pecon plej proksiman al loko kie oni staras/sidas. Avidemo forgesigas tion! – Gxis chi tie la teksto rolas kiel enkonduko, por bildigi la malhelpon kiun acha eduko malhelpas ne nur al Esperanto sed ankau al organizajxo kiun la fierulo volis helpi. Oni restu che ekzemplo per kiu "plenkapabla" homo surpaperigis au tradukis verkon, sen allasi utiltempe kompetentan reviziiston...pro fiero, memkompreneble.- Aliaj, pro fiero elmontri siajn erarojn, neniam submetas sian verkon al revizio kaj la teksto, kvankam leginda, neniam eldonatas. – Mi referas al libreto eldonita en la jaro 1981 – Pro respekto al la autoroj de la diversaj tekstoj, mi silentas pri ties titolo. La primekoj iras al la tradukinto, kiu ne submetis sian verkon al amiko, kompetenta esperantisto. La enhavo de tiu libro, preskau 100 pagxa, estus utila por la idearo al kiu gxi celis helpi. Gxi estis vaste disdonata senpage dum grava E-evento. Domagxe, che eklego oni unuapagxe stumblas kontrau malglatajxo. Rezulto: ech E-lernantoj fordankas gxin char gxi malinstruas, maltaugas al Esperantujo kaj utilo de la idearo proponata. – Chu vi, kara leganto, konvinkigxis pri la valoro de kristana rekomendo, esti humila, ne fiera, kvankam en chi kazo vi miras kiom da homoj mirinde prosperas chirkau via modesteco? – Junuloj sxatas elstarigi sin inter gekolegoj je la kostoj de malbona eduko, por fieri pri sia supereco en sperto kaj avantagxoj. Lau mi, ne vane brazilanoj estas malsxatataj en europaj landoj. Ilia konduto (tagmangxas en luksaj ejoj kun chapo sur la kapo, tenas siajn kubutojn sur la tablon, metas ech la piedojn sur tabloj) kauzas abomenon kaj suspektojn mal honore al nia lando. Oni memoru ke, en landoj kiuj suferas terurajn Cunamojn pro militoj kaj naturaj katastrofoj, formala kunsido, por kuna tagmangxo, estas konsiderata kvazaua dankmanifesto al la Chiopova kaj memorajxo pri ekstremaj mankoj suferitaj, kiam homoj devis mangxi ech greson, por sin vivteni. Lau informoj de homoj vizitintaj Europon, ekzistas butikoj kiuj montras legajxon: estu singarda, brazilanoj cirkulas niaurbe! – Chu tio veras, ne eblis al mi kontroli. – Bonsxance lastaj informoj pri la minejano, mortigita de la londona polico, diras ke li tute ne reagis, ke li estis tute nesuspektinda junulo.

GEA

La tagon 20/8/05 oni estis invitata partopreni la vocxdonadon en GEA. Mi tre volis cheesti sed...sed kaj tamen malhelpas: Mia san-plano GEAP kunvokis min, samtage kaj horo al la

hospitalo IC=Instituto do Coração, por necesa revizio. Se oni ne kaptas la okazon, oni devas prokrastigxi minimume plian semajnon. Vi divenas kion mi preferis. “Ne oldigxu!” ...tiam vi ne plu regos, lau via volo, la de vi disponeblan tempon. Mi tre esperas ke dum la balotado facile superis la konkurantojn, la plej autenta samideano, iu GEA-ano kiu ne pardonos krokodilajxojn en la “sankta sidejo” tamen, sen elitismo! – Se tiel, mi daurigas mian sintenon de veterana soldato kiu tamen krichos kontrau neglektoj. Por komenci, mi grumblas kontrau BEL-estraro. Mi aldonas mian plendon de aliaj samideanoj kontrau ties vochdonado pri kiu oni chi tie en Sudbrazilo kvazau ne eksciis, kiel gxi okazis. Cetere, BEL-estraro tre sxuldas al siaj anoj klarigojn, kial oni varbis anojn per la anonco ke kiu abonos por 2005, tiu ricevos la revuon Brazila Esperantisto sed...gxis pli ol la duono de la kuranta jaro...NIIL!! – Ne farigxu friponoj! – Kio okazas en Braziljo? Chu la estraro ne ricevis la “mensalão?= KROMPAGO”) – Plendu che la nova papo, cetere, vane char la nuna, gxis nun ignoris Esperanton en siaj publikaj alparoloj. – Kion oni kune entreprenu, por peti lian atenton al E°, kun la celo ke Lia Mosxto ne troe postrestu lian antauririnton Karol Vojtila?

LKK de la 40ª BKE.

Plurfoje Gisto publikigis du sugestojn enkondukindajn en E-eventoj krom proponon al la brazila registaro, pri anstatauigo de “MADE IN BRAZIL” per ‘Far Brazil’ sur chiuj produktajxoj brazilaj. Lau mi, ili estas ne ventkapaj elpensajxoj, do seriozaj proponoj faritaj de GEA-ano, kiuj tamen gxis hodiau ne meritis respondon, kial ili estis ne konsiderataj? Silento pli dangxeras ol se la reago estus: iru al infero kun viaj ne oportunaj proponoj! Nu, al edukita estraro restas utiltempo por respondi al GISTO-legantoj, kun rajto al publikigo. Simple ignori viglajn anojn similas al elitisma forpusxo: vi estas ne triagradano, tial rajtas nur pagi kotizojn sed ne pepi! Se mi insistas sur tia klavo, estas pro tio, ke mi rimarkas tian agadon pere de la BEL-laborplano iam prezentita en la E-retejo kaj en evento. La FIERO de elstaruloj forpelas au neniigas valorajn kunlaborantojn. Daure validas: NE KRITIKU, HELPU MIN! se ni sincere alpruas la de BEL proponatan NI LABORU KUNE. – Konstateblis tamen, dum la 40ª, ke multaj gravuloj evitis manpremi kun malsuperuloj. Ili tenis la nazon en la Chielo, ili ech uzis du nomojn...hi...hi...hi – chu kasxnomojn? Chi aserto estas ne klachajxo, gxi veras.

Chu vi jam legis chi tiun spritajxon, en la preso? - EN CIRKO.

Sonis la minuto kiam prezentigxas la leon-dresisto kun sia animalego . La spektantaro atente admiras la numeron sed supite la leono, tiun tagon tre agresema, sukcesis eskapi el ka kagxo kaj feroce avancas kontrau la publiko. Konfuza fugxado okazas, chiu lau sia plej lerta kapablo savigxi. Meze de la fugxantoj povra kriplulo en rulsegxo freneze manovras sed ne sukcese avancas. Iu helpema homo en sava loko alkrias la fugxantojn: atentu al la povra kripulo...helpu lin! La povrulo manovras ankorau pli kuragxe. Ree audigxas: rigardu la kriplulon!. Chi lasta, senpova fugxi pli rapide, kolere krias fortege: karamba!... almenau lasu la leonon mem elekti. // MELKI KAPRINOn – Pro manko de sxnuro kamparano deprenas sian zonrimenon kaj ligis la voston de la kaprino al fosto. Chi-momente la pantalono glitis malsupren kaj lia edzino envenis la stalon! – Chu restas aferoj neniam radikale eksplikeblaj al tro suspektema edzino?

SCIO de “profesia” fraulo: trompi kunulinon facilas, transirigi sxin al aliulo ege malfacilas.
INOJN: chirkaubraki, kisi,amuzi, amori, liberigi, adiaui.